



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo ["FRATECO"]

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA [-] DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16

Hodiaŭ ni publikigas tradukon je unu el plej belaj verkoj de glora, hispanlingva poeto, Rubén Darío. La fama "Rekviemo", plena je vervo kaj je inspiraj aludoj al mitoj kaj moroj el antikva Grekujo, belege esprimas la tutan admiron de la aŭtoro al sia franca kolego Verlaine. Tiu ĉi estas la Satiruso, t. e., la belama kaj amorema homo, kiu ĝuas la plezurojn de la vivo, ne trudante iel la aliajn. Kontraŭe, oni prezentas la Centaŭron, la ĉeval-homon, kiel malmilda, kruda, premema estaĵo (sendube milita, entreprena, ekspluata homo). Sed Satiruso venkas. Fine aperas Kruco, per kiu la aŭtoro simboligas verŝajnan konvertiĝon de la franca poeto. Kaj certe tiu ĉi, krom siaj paganaj versoj, ankaŭ skribis odojn al la Sanktega Sakramento. Jen la bela traduko, samrima kaj samritma, kiel la originalo, kies nepre akcentitaj silaboj estas nur: en la longaj versoj, la 6.^a kaj la 13.^a; en tiuj mallongaj, la 4.^a kaj la 8.^a.

La tradukinto dediĉas sian verkon al la Aragona Esperanto-Federacio, okaze de la eldono de Sango kaj Sablo, belega traduko farita de klera kaj kompetenta S-ro. Ramón de Salas, kies plentrafa kaj meritega laboro hodiaŭ nin honorigas antaŭ la tutmonda esperantistaro.

M. V.

REKVIEMO

(AL VERLAINE)

Patro, magia majstro, liroforo ĉiela:
Vi sur l'Olimpa ilo kaj l'kamparfluto hela
Ludadis laŭ ĉarmega ton'.
Panido, vi mem Panc, korusojn kondukinta
Al sankta propileo, vin, malĝojan, plaĉinta,
Laŭ sistra kaj tambura son'.
Vian tombon surkovru Printempo per flortego;
Eĉ de besto sovaĝa la malmilda buŝego

Tie sin trempu per amben'.
Ke la funebnan lokon dukorna Pan' ĉeestu;
Per kvazaŭsangaj rozoj Aprilo ĝin survestu
Kaj per dianoj el ruben'.
Se iam korvo emos sidi sur tombo via,
Ferpelu la nigrecon de la birdo malpia
La kristaldolĉa melodi'.
De Filomel' verŝata sur l'entombajn mizerojn
Aŭ l'ridkisaj susuroj, signantaj kaŝmisterojn
El arbarama religi'.
Kaneforaj knabinoj vin por akantofero
Vizitu; tombon vian ne surverŝu larmero,
Sed roso, vino kaj miel'.
Ke l'arbetar' burĝonu por la Citeraj floroj
Kaj de sub laŭr' simbola ĝemoj el inaj koroj
Mildege ŝvebu ĝis l'orel'.
Se, nova Vergilio, per flut' sub ombraj fagoj
Paŝtisto sin ekzercos pri kant' dum amaj tagoj,
Estu nom' via ĉe l'ari';
Kaj Najado virgjeta, tian nomon aŭdante,
Sopirangore luktu, ĉe l'akvo baraktante,
Plena je tim' kaj ampasi'.
Dumnokte, sur la monto, sur la nigra montego
De l'Vizioj, tutstranga vidigu sin ombrego
Kvazaŭ de spektra Satirus'.
Ĝi laŭ grandec' timigu la Centaŭron kruelan;
De superhoma fluto adaptu l'tonon belan
Laŭ l'harmonia stelkorus'.
Kaj l'ĉevalar' forkuru tra la montaro vasta;
Vian transmortan bildon surbanu Luno ĉasta
Per blanka lumo de bonvol'.
Kaj l'Satirus' rigardu sur malproksima monto
Krucon tutampleksantan fonon el horizonto...
Kaj super Ĝi, jen aŭreol'.

Hispane verkis Rubén Darío.
Samritme kaj samrime esperantigis

MANUEL VÁZQUEZ.

EL «KIHOTO»

ĈAPITRO VIII

Pri la bona sorto, kiun la kuraĝa don Kihoto havis en la teruriga kaj neniam imagita aventuro ĉe la ventmueliloj, kun aliaj okazintaĵoj indaj je feliĉa rememoro

Jen ili vidtrafis tridek aŭ kvardek ventmuelilojn starantajn sur la kamparo, kaj tuj kiam don Kihoto ilin rigardis, li diris al sia armservisto:

—Feliĉo estas gvidanta niajn aferojn pli bone, ol ni mem trafus deziri, ĉar tie vi vidas, amiko Sanĉo Panza, kiel elmontriĝas tridek aŭ iom pli da supermezuraj gigantoj, kun kiuj mi intencas batali, elpreni de ĉiuj la vivon kaj per la venkakiraĵoj ni ekriĉiĝos, ĉar tiu ĉi estas prava milito kaj granda servo al Dio forŝiri tian malbonan semon el la tergloba supraĵo.

—Kiujn gigantojn?, diris Sanĉo Panza.

—Kiujn vi tie vidas, kun longaj brakoj, ĉe iuj ofte atingantaj preskaŭ du mejlojn.

—Atentu, via Moŝto, respondis Sanĉo Panza, ke tiuj, kiuj montriĝas tie, ne estas gigantoj, sed ventmueliloj, kaj kio ŝajnas iliaj brakoj, tio estas la kruĉturnilo, kiu rondirigita de la vento, movigas la muelŝtonon.

—Oni tuj vidas, respondis don Kihoto, ke vi ne estas kompetenta pri aventuraj aferoj; tio estas ja gigantoj, kaj se vi timas, iru flanken kaj restu en preĝado, dum mi iras ekligi kun ili teruran kaj malfacilegan batalon. Tion ĉi dirinte, li spronincitis sian ĉevalon Rocinanton, ne atentante la kriojn de sia armservisto Sanĉo, lin avertantaj, ke tio estas sendube ventmueliloj, kaj ne gigantoj, kiujn li estis ekatakanta. Li kredis tamen tiel obstine pri gigantoj, ke li ne aŭdis la kriojn de sia armservisto Sanĉo, nek rimarkis malgraŭ jam sufiĉa alproksimiĝo, kio ili estas, tute male li alkuris laŭdirante. Ne forkuru, malbravaj kaj malgloraj kreitoj; nur unu kavaliro vin atakas. Samtempe venteto ekblovigis, la grandaj kruĉturniloj ekmoviĝis, kaj tion vidinte, aldiris don Kihoto: Eĉ se vi movos pli da brakoj, ol giganto Briareo, vi pagos al mi por tio. Post ĉi tiuj vortoj, li tutkore penseturnis sin al sia amatino Dulcineo, petante, ke ŝi helpu al li en tia danĝerokazo. Bonsirmita de sia rondŝildo, kun la lanco alpremita al ĝia apogilo, li sin atakjetis laŭ plej rapida galopado de Rocinanto kaj ektuŝegis la unuan kontraŭ li starantan ventmuelilon, enpikante en ĝian kruĉturnilon, dum la vento ĝin rondirigis tiel furioze, ke la lanco dispeciĝis, detirante post si la ĉevalon kaj kavaliro, kiu rulis teren tre disbatite. Sanĉo Panza alvenis lin helpi laŭ plej rapida kurado de sia azeno kaj konstatis tuj, ke li ne povas sin movi: tiel granda estis la batego, kiun li ricevis kun Rocinanto.

—Dio al mi helpu! diris Sanĉo, ĉu mi ne diris al Via Moŝto, ke vi atentu tujfarotaĵon, ke tio nur estas ventmueliloj kaj nur ilin havante en kapo, oni povus tion nescii?

—Silentu, amiko Sanĉo, respondis don Kihoto, pli ol la aliaj, la militaj aferoj estas submetitaj al senĉesa ŝanĝiĝo. Krom tio mi pensas, kaj estas ja vere, ke tiu saĝulo Freston, forrabinta de mi la ĉambron kaj librojn, tiujn gigantojn aliformigis

en ventmuelilojn por elpreni el mi la gloron ilin venki; tiel granda estas lia malamikeco al mi, sed fine, ja fine, liaj malbonaj ruziĵoj malmulte povos kontraŭ la efiko de mia glavo.

—Dio ĝin faru, kiel Li povas, respondis Sanĉo Panza, kaj helpante al li sin levi, li sukcesis, ke don Kihoto residiĝu sur Rocinanton, kiu estis kun ŝultro duonrompita. Parolante pri la ĵuspasinta aventuro ili daŭrigis sian iradon sur vojo al Puerto Lápice, kie, laŭ diro de don Kihoto, ne povis manki multaj kaj diversaj aventuroj, ĉar ĝi estis loko, kiun multaj trapasis, sed li vojiris tre malgaje pro la perdo de sia lanco, kaj dirinte tion al sia armservisto, li aldonis:

—Mi rememoras esti leginta ke hispana kavaliro, nomita Diego Pérez de Vargas, al kiu dum batalo rompiĝis la lanco, el kverko deŝiris pezan branĉon aŭ trunkon, kaj per ĝi li tiun tagon faris tiajn, aferojn kaj mortelbatis tiom da maŭroj, ke li ricevis la alnomon "Machuca" (*); de tiam li kaj liaj posteuloj ĉiam nomiĝis Vargas kaj Machuca. Tion ĉi mi rakontis al vi, ĉar el la unua kverko aŭ glanarbo, kiu okaze montriĝos, mi intencas deŝiri alian trunkon, tian kaj tiel bonan, kiel la imagita de mi, kaj mi esperas fari per ĝi tiajn herojajn, ke vi kredu vin bonsorta esti meritinta alesti kaj resti atestanto de aferoj, kiujn oni apenaŭ povos kredi.

—Je la Dia volo! diris Sanĉo, mi kredas ĉion, same kiel Via Moŝto eldiras, sed rektigu iom vian korpon, ĉar ŝajne vi rajdas flankturnite, kredeble pro la fala trabatiĝo.

—Vere estas tiel, respondis don Kihoto, kaj se mi ne plendas pro doloro, ĝi estas, ĉar oni ne permesas al vagiraj kavaliroj plendi pro kia ajn vundo, se eĉ tra ĝi la intestoj elirus.

—Se estas tiel, respondis Sanĉo, mi nenion havas por rediri, sed Dio scias, kiom plaĉus al mi, se Via Moŝto plendus, kiam io vin dolorus. Mi sciigas miavice, ke mi plendus pro plej malgranda doloro, kompreneble se la malpermeso plendi ne atingas ankaŭ la armservistojn de la vagiraj kavaliroj.

(Daŭrigota).

El hispana lingvo tradukis
VICENTE INGLADA.

(*) MACHUCA (elparolu Maĉuka) signifas hispane: ELBATANTA..

Esperanto en la Valencia «Specimena Internacia Foiro»

Pro antaŭa kutimo, ankaŭ nunan jaron la "Grupo Esperantista Valencia" prezentis montroĉambron por propagandi Esperanton, ĉe la 28^a Specimena Internacia Foiro, kiu daŭris de la 12^a ĝis la 30^a Majo 1935.

Tie estis ekspoziciaj standoj farantaj propagandon pri valenciaj produktaĵoj (meblaro, vinoj, orangiĵoj...) anglaj karboj, usonaj maŝinoj, germanaj radioaparatoj, ĉeĥoslovakaj reklamartikloj, francaj aŭtomobiloj, italaj ĉapeloj, finnaj lignoj, svisaj horloĝoj ktp. inter ili, kvazaŭ eco de la internacia medio, staris verda ĉambro, ĉe kies fundo

pendis granda monda landkarto kaj sagoj sindirektantaj al ĉiuj kontinentoj montris ke Esperanto estas parolata ĉie, tial ĝi estas ja inda je praktika uzado en la internaciaj aranĝoj, nome foiroj, ekspozicioj, kongresoj ktp. Nur anoj de la Valencia Grupo faris ĉiujn preparajn kaj eĉ metiajn laborojn pri konstruado de la stando, kiu aspektis kiel stilmoderna verda ĉambro kun videblaj paragraftoj pritraktantaj utiligon de Esperanto en radio, komerco, scienco kaj turismo.

En la stando mem, deĵoranta esperantistino disdonadis 10.000 sorbpaperajn foliojn kun hispanlingva propagando, ankaŭ ŝi vendis tie ŝlosilojn de Esperanto, vortarojn kaj gramatikojn. Ĉar en la foira oficiala poŝtofiĉejo deĵoris ĉiutage esperantista oficisto, aperis ĉe ties giĉeto afiŝo kun la vortoj "Esperanto parolata".

La farita propagando celis ke la popolamaso alĉutimiĝu rigardi Esperanton, ne kiel nebulan utopion aŭ malnulte disvastiĝintan revon, sed kiel oni rigardas ofteuzatan flankon de la popoklereco.

Tuja efiko de tiu reklamo estis aranĝo de kurso por komencantoj, kiu okazas en la loĝejo de la Grupo Esperantista Valencia.

F. BOSCA.

Valencia.

LA FIDELA FIANĈINO

Dediĉas:

*Al ĉiuj fidelaj fianĉinoj
de la tuta mondo.*

Oni rakontis al mi ĉi tiun veran okazintaĵon tie mem, ĉe la elirejo de la vilaĝo, kie la altaj popoloj dekoraciadis la bordojn de la gaje fluanta rivereto, ĝuste tie, kie Elisabeto kaj Francisko Josefo disigis dudek jarojn antaŭe.

Elisabeto estis dekokjaraĝa knabino de mezkreska staturado, de grandaj okuloj, de malgaja mieno kaj de animo nobla.

Li, Francisko Josefo, estis dudek-trijara filo de malriĉiĝintaj nobeloj, pro kio, antaŭ ol malnobliĝi prilaboronte la teron, preferis li formigri al Ameriko serĉe de havaĵo.

Ili adiaŭdiris unu al la alia iun aŭtunan vesperigon en tiu loko, for de la vilaĝo kaj piede de la altaj popoloj, sur kies supro, la branĉetoj kvazaŭ kunsusuradis la lastajn plenamajn vortojn de la kun korpremo disiganta paro.

—Ĉu vere vi atendas min ĉiam, Elisabeto?—flustradis la voĉo de la tujforironto.

—Mi atendados vin ĉiam, Francisko Josefo. Mi estas via fianĉino...

Kaj ekde tiun tagon, en kiu foriris la fianĉo, ĉiuvespere, kiam la malnova omnibuso revenadis de la malproksima stacio, la maljuna veturigisto vidadis piede de la altaj popoloj la malgajan figuron de Elisabeto atendanta la revenon de la amato.

Pasis monatoj, jaroj...

Iun tagon ŝin trafis subite malgajiga novaĵo:

—Ne plu atendu lin, Elisabeto. Fremdulo ĵusveninta de tie diris, ke Francisko Josefo estas mortinta.

Ŝi ne ploris; eĉ ne palpebrumis la malfeliĉulino. Animo el fero forĝita por la amo kaj la fido ricevis la kruelan baton sen videblaj ekstretoj...

Kaj je la sekvanta tago, kiel ĉiujn vesperojn, Elisabeto staradis ĉe la vojo, apud la rivereto, piede de la altaj popoloj, sub la ĉielo ŝtorkolorigita per la krepusko.

Pasis monatoj, jaroj...

—Kion vi atendas, Elisabeto?

—Mi atendas Franciskon Josefon. Mi estas lia fianĉino—respondadis ŝi ĉiam per milda voĉo unu-tona.

Unuj ridis, sed la plimultaj sentadis kompaton pri tiu mirinde fidela kaj malnoble forgesita fianĉino, por kiu vane pasadis la tempo neniam perdanta la esperon kaj la fidon pri la amata foririnto...

Kaj estis ŝi la sola en la vilaĝo kiu ne eraris: la malgajiga novaĵo estis nevera, ĉar Francisko Josefo vivis ankoraŭ, sed...

Iun tagon li alvenis al sia naskiĝloko per mirinda aŭtomobilo, luksaĵo atingita per lia akirita riĉeco.

Kun li kunveturadis iu eleganta sinjorino—lia edzino—kaj du iliaj gefiloj.

La aŭtomobilo haltis antaŭ la funebrevestita figuro de la fidela fianĉino—la fianĉino de pala kaj malgaja vizaĝo kiu atendadis ĉiam ĉe la elirejo de la vilaĝo.

Francisko Josefo, rekoninte en ŝi la fianĉinon de la junulaj jaroj, eksaltis teren kaj alkuris plenge al ŝi.

—Elisabeto!—ekkriis li—kion vi faras ĉi tie?

Ŝi, kiel ĉiam, larĝigis per dolĉamara rideto sian delikatan buŝon, alrigardis indiferece la viron de grizaj haroj starantan antaŭ ŝi kaj respondis kiel ĉiam:

—Mi atendas Franciskon Josefon. Mi estas lia fianĉino.

—Nu, mia kara, Francisko Josefo ja estas mi. Ĉu vere vi ne rekonas min?

—Ne; vi povas esti Francisko Josefo, sed ne mia fianĉo.

Ĉe tio alproksimiĝis vilaĝanino kaj interrompis: —Lasu ŝin, sinjoro; ŝi estas la fianĉino kiu frenezigiĝis atendente la revenon de la fianĉo.

La animo de la viro fulmobatis. Sufiĉis unu minuto por kompreni la tutan, la grandan tragedion, kiun li kaŭzis al ĉi tiu kompatindulino, morta en vivo. Li ekremis. Fariĝis ĉio al li malhela. Ĉio turniĝis kaj turniĝis ĉirkaŭ li kaj al li ŝajnis ke la kapo kvazaŭ krevus pro premforto. Li volis paroli kaj furioza puŝo de ĝis nun nekonata sensacio atakis lian gorĝon kaj li ne povis, ne plu povis paroli dumvive...

Koncerne Elisabeton ne plu ankaŭ ŝi povis eliri el sia ĥimero kaj ankoraŭ oni povas ŝin vidi ĉiujn vesperojn apud la rivereto kaj piede de la altaj popoloj atendente la revenon de sia amo je la mirinda ĥoro nepriskribebla de la krepusko ŝtala, ŝtala kiel ŝia animo, kiel ŝia fido ŝtala!

RICARDO QUILES.

Valencia, majo 1935.

La Nunjara Universala Kongreso

Ĉiam partopreno je Universala Kongreso estas por esperantisto granda allogaĵo. Nuntempe oni emas vojaĝi, oni avidas vidi fremdajn landojn, fremdajn, strangajn popolojn. La animo de ĉiu moderna homo sufokigigas en sia hejmurbo, en sia hejmlando kaj bezonas pli multe da spaco, flugi tra la mondo kaj esplori ĉion.

Tial la aranĝado je kolektivaj vojaĝoj, ĉu vagonaraj, ĉu motoromnibusaj aŭ ŝipaj, ĉefe por viziti fremdajn landojn, pli kaj pli oftigas kaj sukcesas, ĉar ĝi kontentigas tiun sopiradon de modernulo. Sed tamen plej ofte oni vojaĝas nur inter samnaciaj kaj, malgraŭ ke oni estas meze de fremdlando, oni konscias sin tro hejmece pro tia samnacia akompanantaro.

En la Esperanto-Kongresoj tio neniel okazas; oni povas ĝuadi ĉe ili ne nur la vizitatan landon, sed ankaŭ, kaj eble tio estas la plej grava allogaĵo, la kongresanojn mem, kiuj, ne perdinte sian por ni fremdan kvaliton, estas dank' al nia kara lingvo tute kompreneblaj de ni, do, trapenetreblaj de nia esploravida spirito.

Tre baldaŭ komenciĝos la Kongreso en Romo, pli ĝuste dirate, en Italujo, ĉar estos preskaŭ la tuta lando, la lando de l'arto kaj de l'historio, travizitata de la kongresanoj, dank' al la bonega aranĝo de la italaj samideanoj, kiuj eĉ preparis krozaĵon per la ŝipego Sinaia al Afriko, al la negra kontinento, kie esperanto estas ankoraŭ preskaŭ tute nekonata. Ja la allogo de la nunjara Kongreso tre multe superas la ordinaran nivelon kaj espreble ĝia famo grandskale efikos la disvastigon kaj altrangigon je nia bela lingvo.

SANTA CRUZ DEL GRÍO

Antaŭ kelkaj tagoj ni estis vizitataj de Sro Castillo, pastro de Santa Cruz del Grió, tre fervora esperantisto, kiu sciigis al ni, ke en tiu vilaĝo krom la kuracisto Sro. Fernández de la Puente, kunlaboranto de NIA VIVO, kaj li mem estas areto da samideanoj, kiuj intencas fondi esperantistan rondon.

Ni multe ĝojos, se tiu ĉi intenco fariĝos realo, ĉar ne nur por la propagando, sed ankaŭ por la entuziasmo kaj allogo je la lingvouzantoj, kuniĝo estas efikega. Jes, ili fondu rondeton kaj ili nur parolu esperante inter ili. Jen plej taŭga propagando!

INVITO

Ĉar ofte estas vilaĝoj kaj eĉ urboj, kie nur ekzistas unu aŭ du izolitaj esperantistoj kaj sekve ili tute ne povas ekzerci sian lingvan paroluzon, oni invitas ilin, okaze ke ili venos en nian urbon por kelktaga restado, partopreni la superan kurson, kiu en somero konsistas el agrablaj, vesperaj promenoj, dum kiuj nur esperanto estas parolata sub la gvidado de la profesoro. La aŭdado je bonparolantoj kaj la partopreno en konversacio lertigos kaj kuraĝigos ilin rapide kaj permesos al ili sperti la nedifineblan ĝuon paroli nian harmonian lingvon.

LA ĈEĤOSLOVAKAJ DISRADIOĴOJ

La "Verda stacio" de Brno, adiaŭis la 3-an de julio por du monatoj siajn esperantistajn aŭskultantojn per dialogo, en kiu ĝi, invitis siajn malproksimajn amikojn al vizito je Ĉeĥoslovakujo. Per tiu-ĉi elsendado ili finas la nunjaran sezonon, por povi des pli bone prepari sin por la programo de la venonta sezono, kiu komenciĝos en oktobro. De tiu monato ili provos envicigi monate du elsendojn, el kiuj la unua (en la unua semajno) enhaziti fremdajn landojn, pli kaj pli oftigas kaj sukla dua elsendo (en la dua semajno) estos efektiva "Esperanta horeto" kun literatura kaj muzika enhavo, kiun oni povus jam en la elsendo de la unua semajno prepari. Niaj samideanoj dediĉos la somerajn monatojn al intensiva preparado por la ĉefa programsezono kaj ili petas siajn aŭskultantojn, ke ili ankaŭ en la venonta sezono dediĉu sian atenton al ili.

Ĉiuj esperantistoj devas ja esti dankaj al la samideanoj de Brno pro ilia sukcesanta fervorego por plialtigi la rangon de la internacia lingvo pere de siaj disradiaĵoj.

SPRITAĴOJ

Inter poeto kaj kreditoro lin preme sieĝanta:

—Nu, finfine, kion vi postulas el mi?

—Kion mi postulas? Tute klare, mian monon!

—Ho, se estas tio ĉi, mi retranskribiĝas! Mi ja erare supozis, ke vi postulas tiun mian.

* * *

Inter studentoj:

—Oni malaprobis min en ekzameno du sinsekvajn jarojn pro io, pri kio mi pravas... Pro tio ke mi diris, ke insulo estas lando ne tute ĉirkaŭata de akvo.

—Tiukaze, amiko, vi ne pravas!

—Jes, mi pravas, ĉar supre ne ĝin ĉirkaŭas akvo... Tamen hodiaŭ, se tion oni al mi redemandos, mi respondos..., ke tute ĉirkaŭata de akvo.

—Jen, vi estas fine devigata cedi, ĉar vi ne pravis!

—Tute jes! Nur okazas, ke hodiaŭ pluvegas.

ANEKDOTOJ

S-rino de Staël demandis iam Napoleonon: "Kian virinon vi pli ŝatas?"—"Tiu, kiu havas pli da infanoj" rapide respondis la imperiestro.

* * *

Kelkaj religiuloj iam interparoladis pri la aĝo kaj faroj de Nia Sinjoro, kaj konsentis, ke li komencis preĝi je la fino de sia trideka jaro. Iu nesciulo demandis ilin, kion faris Jesuo-Kristo tuj post la fino de sia trideka jaro, kaj ĉar ili ŝanceliĝis pri tio, li aldiris: "Jen vi estas embarasitaj malgr. ŭ via tuta sciado. Kion li faris antaŭ ĉio, tio estis eniri en lian tridekunuan jaron".

(Pogge)

El la franca tradukis

VICENTE INGLADA.